HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 84 - 1973

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



# FORPASIS GRANDA POETO

Notoj..................1-4-5-8
Hommedio...............2-3
Ho! tiu lardo...........6-7
La hipioj................9-10
Savarmea kanto............10-
Pablo Neruda................11-
Krioj de l'mizero.............12-

# NOTOJ

-----Malgraŭ nia volo, denove, pluraj eraroj aperis en la lasta numero de nia bulteno. Ni klopodos tion forigi, kvankam ĝi estas malfacile pro la manko da laborantoj.

-----En nia lasta numero ni petis al ĉiuj HEJS-anoj altlernejaj studentoj, bonvolu sciigi tion al ni por ebligi kunlaboron kun Studenta Pola Asocio. Ni estas ege kontentaj pro la fakto de ke ni unuafoje atingis respondon al iniciato nia. Jes, ni ricevis..... 1 respondon de HEJS-anino, universitata studentino. Surpriziga estas la fakto ke nur unu el niaj membroj eniris la universitaton. Eble eston.. iniciato nia atingos 2 respondojn. Ĉu vere? Kia feliĉo !!.

-----Organizo por kolektantoj de E-insignoj ĵus fondita faciligas interŝanĝon inter tiaj kolektantoj kaj neregule eldonas bultenon kaj mankolistojn. La jara kotizo estas 6 internaciaj respondkuponoj. Adreso de la asocio estas :

VLAĎA HASALA
S.K.N. 37
695 03 HODONIN
ĈEĤOSLOVAKUJO

-----Korespondа Servo de TEJO akceptas adresojn de geesperantistoj kiuj povas aperigi siajn adresojn en korespondbulteno kaj samtempe oni povas ricevi korespondbultenojn. Krom la monon kaj adreson oni devas ankaŭ aldoni aĝon kaj interesiĝon. Se iu volas ricevi korespondbultenon, devas aldoni respondkuponon. Adreso:

KORESPONDA SERVO DE TEJO
Str. Kujawska, 24
SOPOT ( Pollando)

# hommedio

Novaj ventoj blovas lastatempe tra la mondo sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco, ĉu politikaj, ĉu sociaj, ĉu ekonomiaj, ĉu simple homaj. Tamen unu el plej konscie aprobata de ĉiuj estas la hommedio, la vivmedio ne nur de la homaro, sed ankaŭ por la homaro. Ĉiutage leviĝas vortoj kontraŭpoluciaj kaj defendante la naturprotektadon. Nia lando ne povis aparte forgesi tiun modan problemon kaj eĉ estas Fonduso kiu dotis per tri milionoj da pesetoj konkurson pri tiu temo, precize por studi la "defendon de la naturo kaj de la medio en la urbo de Santander kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj". Tiu konkurso estas la plej grava en sia klaso ĝis nun en nia lando. La juĝantaro estas elstaraj personoj de nia lando, precipe fakuloj pri tiu temo. Intence mi forlasos kaj forgesos la sendubajn konsekvencoj de tiu studo kaj la eblan celon de la gvidantoj de tiu Fonduso por elspezi tiom da mono.

Tiuj aspektoj de la homa kunvivado kaj de la tera ekologio interesis ankaŭ esperantistajn organizojn, inter ili plej grava estas T.E.J.O., kiu organiziz, kadre de la nunjara IJK, seminarion pri "Junularo kaj Hommedio", kaj Junulfako de SAT, kiu en unu el lastaj revuoj dediĉas apartan atenton por serioze pritrakti la temon.

Ĝis nun la plej profunda monda ago estis la UN-Konferenco de Stockholmo (junio 1972ª) kaj ties "Deklaracio". Plej interesaj estas la unuaj artikoloj kiuj resume estas jene: Ami la fraton, la homon kaj eviti ian ajn formon de fremda regado; respekti la naturajn rimedojn de la Tero, inkluzive aeron, akvon, teron, flaŭron, faŭnon; subteni la teran kapablecon en ĝiaj renovigeblaj vivrimedoj; ne meti en danĝero la bestan vivon; ne malŝpari rimedojn nerenovigeblaj; limigi la verŝŝuton de toksaj substancoj; eviti malpurigon de la maroj; ktp.

Ekzistas ankaŭ teknologiaj satelitoj kiuj jam studas diversajn specifajn fakojn de tiu ĉi temo : Ekzameno de la polucio, evoluo de glaciiĝo kaj degelo, urbaj amasoj, valoraj ecoj de ekologio, detekto de infektoj pro insektoj; ktp. en difinitaj regionoj de Usono. Krome ili realigas dezirojn de aliaj landoj pri problemoj koncerne al ili; ekzemple, por Aŭstralio, Ĉilio (studojn pri vulkanologio), Kolombio (ekologion por adopti protektojn por la popola sano), Grekio (agrajn kaj arbarajn studojn), Norvegio (studojn pri glaciaj maroj kaj translokiĝon de glaciaĵoj),ktp.

Tamen la plej grava problemo por solvi tiun mondproblemon estas la vasteco de la rilantataj aspektoj: aero kaj akvo-malpuriĝo, senlima ekspluatado de la naturo, bruoj, atombombaj eksplodoj, ktp. Studoj pri la ekologio de la vegetaĵoj kaj bestoj, geologiaj esploroj pri la interna altiveco de la Tero, meteorologiaj esploroj pri naskiĝo de ŝtormoj, oceanografia observado pri abunda aŭ malabunda fiŝkapteblecoj,....intencas trovi solvojn aŭ almenaŭ helpi mildigi la nunajn malesperojn kiuj atendas la estontan homaron, se niaj aktualaj klopodoj fiaskas.

Alia aspekto, ankaŭ pritraktita de la TEJO-Seminario, estas la socia hommedio, kiun ni nepre ne devas forgesi. Per studoj de socia ekologio kiuj rekonas la demografiajn mienojn kaj esploras problemojn rilate al financado, migrado kaj divido de homaj grupoj (urbanismaj fenomenoj, analfabeteco, nomadismo, malsanoj, gastlaborismo, diskriminacioj, mizero, ktp.). Kompreneble, ni devas atentigi la multnombrajn nerektajn faktorojn kiuj limigas la historian kaj etnologian fundon de la socia fenomeno. Do, laŭ tiu spirito, kunlaborado kun la TEJO-programo estas, el tiu vidpunkto, plenumenda.

Skribinte tiun ĉi artikolo mi legis interesan raporton sub la titolo "La malpurigo, la prezo de progreso", en la kadro de informo pri la grandaj urboj kaj ties problemoj, rilate al nia lando ("Dossier Mundo, februaro, 1973). Do, tiuj urboj estas: Madrid Barcelona, Valencia, Sevilla kaj Bilbao. Tiu studo post rememoro de la gravaj okazintaĵoj de Donora

(daŭrigota)

J.Azkuenaga- (Santander

GOJIGA NOVAJO:

En Madrido ĵus reviviĝis nia movado. Nun, en la strato Hortaleza 31, 2º estas Liceo Esperantista.

Ankaŭ oni organizis kurson tie kun sufiĉe multaj lernantoj. Ni plenespere deziras al ĝi sukceson.

ANTAUEN !!

& & & & & & & & & & & &

Junularaj blankaj ferioj en Koronowo de .... 27-XII-73 ĝis 4-1-74. Kotizo: 25$ . Aliĝlimdato.. 1-XII-73. Informojn kaj aliĝojn ĉe :

Budapeŝta Komitato de Hungara E-Asocio
H- 1443 BUDAPEST
Poŝtkesto 153, Hungarujo

$ & $ & $ & $ & $ & $ & $ & $ & $ & $

DEZIRAS KORESPONDI .........

24-jara oficisto, kun hispanaj gejunuloj . Lia adreso:

PAVEL ACHRER

Str. Husova 502, 676-02 MOR. BUDĚJOVICE


ĈEĤOSLOVAKIO -

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =




el "Sábado Gráfico" Trad. Mari Jose

Helpu la financojn de HEJS aĉetante nian loterion, vi bonŝancos. Ni deziras sciigi al vi ke ni havas loterion je la nº61.246 kies kosto estas 50 Pts aŭ 10 Pts, krom - plia 20% (t.e. 60 Pts kaj 12 Pts respektive) po unu kvitanco. Tiuj 10 Pts estas aĉeteblaj minimume po 5 kvitancoj.




Do, ĉiuj interesantoj povas de nun mendi kiom ili volas, limdato por mendi estas la 10ª de Decembro. Do, post tiu dato ni ne plu akceptos mendojn kaj ni estos koredankemaj se vi mendas kiel eble plej baldaŭ. Ĉiujn mendojn faru al F-ino María Gálvez
Str. Pedro Astigarraga 2-320
BILBAO-14

Sendu la monon per poŝtmandato.

LA ESTRARO

$ $ $ $ $ $ $ $$ $ $ $ $$ $ $ $ $ $$ $ $ $

HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISP

Como el año anterior tenemos participaciones de lotería de 50 Pts y 10 Pts, más 20%, es decir, 60 Pts y 12 Pts respectivamente. Las participaciones de 10 Pts sólo se pueden adquirir a partir de cinco.

La Estraro

$%$%$%$%$%%%%$%$%%$% %$%$%$

Oni organizis E-kurson en Sta. Coloma de Gramanet en la ejo de la Ruĝa Kruco. Klasoj ĉiuĵaŭde de 20,30 ĝis 21,30 .

& & & & & & & & & & & & & & & & & & &

# HO! Tiu Lardo

Antaŭ nelonge mi estis invitata manĝi en luksa, tre luksa hotelo. Ĝi estis unu el tiuj manĝadoj, kiuj nomiĝas laŭ la moderna maniero " manĝado de laboro ".

Mi ne povas nei, ke mi ĉiam deziris manĝi en iu el tiuj luksegaj restaracioj, almenaŭ por scii -kio okazas tie- . Mia deziro plenumiĝis, sed bedaŭrinde ne ĉio rezultis kiel mi pensis antaŭe.

Se mi diras al vi, ke kiam mi forlasis la hotelon, post duhora manĝado, mi ankoraŭ malsatis, vi jam povas imagi, kio okazis tie.

En tiu hotelo ne estis kelnerinoj, nur kelneroj, ĉar laŭdire tio estas pli eleganta, pli luksa, ĉu vere?, mi ne scias; eble jes, sed mi ne komprenas la kialon. En mia opinio ili ne ŝajnis kelneroj, sed maharaĝoj pro la granda amaso da ornamaĵoj, kiujn ili kunportis. Verdire mi multe ilin rigardadis.

La tablo estis granda, sed ĝi estis plenplena de glasoj, teleroj kaj amaso da manĝilaro. Tio estis novaĵo por mi, mi neniam vidis tiom da ujoj kaj iloj por manĝi.Tuj mi pensis; Kial tiom da glasoj kaj pokaloj?. Kial tiu vico da teleroj? kaj kio estis pli grava por mi, kial tiuj strangaj forketoj kaj tranĉiloj? . Mi nervoziĝis, ĉar tuj mi komprenis,ke mi ne kapablus uzi adekvate tiun amason da "instrumentoj" .

La tuta manĝado konsistis el fiŝaĵoj; kelkajn el tiuj fiŝoj mi jam konis, sed la aliaj neniam estis viditaj de mi kaj eĉ mi ne konis iliajn nomojn. De kie venis tiuj fiŝoj?. Kiel ili estas nomataj?.

Sed la terura momento venis kiam mi devis ekmanipuli la manĝilaron. Mi prokrastris iomete la ekmanĝadon por ion "kopii" de la aliaj kunmanĝantoj, sed mi nenion lernis, ĉar nur praktikon mi bezonis por manĝi.

Kiom da fuŝaĵoj mi faris dum la manĝado!. Mi tute ne kapablis dispecigi la fiŝaĵojn. Kiam mi devis uzi la forketon mi uzis la tranĉilon aŭ inverse. Mi troviĝis en terura konfuzo. Ho ve! se mi povus utiligi miajn fingrojn !. Sed ne, tio ne eblis. Kion ópinius la aliaj kunmanĝantoj !! .

La realo estis, ke la manĝado preskaŭ finiĝis kaj mi malmulte metis en mian stomakon, kiu siavice protestadis pro malsato. Mia embaraso estis grandega pro mia malsperto, manĝi laŭmaniere de tiuj luksaj hoteloj. Ankoraŭ mi memoras ke unu el miaj plej grandaj fuŝaĵoj okazis jene: Mi intencis dispecigi fiŝon. Mi opinias,ke ĝi estis io simila al krabo,sed mia tranĉilo glitis sur la karapacon kaj la krabo saltis el mia telero, kvazaŭ ĝi estus leporo, sur la jakon de mia gastiganto. Kvankam ĉiuj multe ridis pro tiu okazintaĵo, mi restis serioza kaj hontema.

Amikoj miaj, en mia vivo neniam mi travivis momentojn tiel malfacilaj por manĝi,malgraŭ tio, ke sur la tablo troviĝis amaso da manĝaĵoj. La rezulto estis, ke la manĝado finiĝis kaj mia malsato daŭris. Jes, mi manĝis la deseron, tio estas, dolĉaĵojn, - kiujn ĉar ĝi ne havis ostojn aŭ karapacon mi bone "kaptis" per la stranga kaj speciala kulereto. Eĉ panon mi ne povis manĝi, ĉar dum tiuj manĝadoj la pano estas malofta.

Kiam mi vidis ke la elegantaj kelneroj demetis la telerojn kaj mia stomako sentis- la pezon de la malpleno- mia penso tuj flugis al mia vilaĝo. Ho ve! Feliĉaj tagoj, kiam mi manĝis lardon kun pano kaj trinkis ordinaran vinon. Tie kie ne estis tiu stranga manĝilaro!. Tie,kie mi metis la fingrojn en la buŝon kaj purigis ilin laŭdezire!. Tie kie en la vinkelo mi sidadis aŭ kuŝis teren laŭ propra volo. Tie kie mia stomako ne malsatis!. Tie mi ja sopiris esti. HO! TIU LARDO DE MIA VILAĜO !!!.

L. Serrano Pérez
(SABADELL)

# 1ª HEJS-TENDARO

Laú ni informis en nia antaúa numero, ni aranĝos renkontiĝon venontjare; la dato estos de la 23ª ĝis 26ª de Majo ĉe kampadejo en Zaragozo.

Se vi principe planus partopreni en ĝi, bonvolu, provizore sciigi tion al ni jam de nun por ke ni faru proksimuman kalkulon da partoprenontoj.

LA ESTRARO

FILATELISTA UNUIĜO DE RUHRA ESPERANTISTA JUNULARO (prizorganto de FONDUSO TUTMONDA HELPO) kontraú kvantoj da hispanaj (kaj francaj kaj germanaj okc. kaj sovetaj) specialaj poŝtmarkoj sendos samajn kvantojn da alilandaj, la oferto daúre validos. Adreso :

F. U. de R.E.J.
D- 42, OB-11,
JÄGERSTR 27, - F.R.G.

Ĉe tiu-ĉi supra adreso ankaú oni akceptas (donace) ĉiajn uzitajn poŝtmarkojn. Profito de ilia vendado ankaù estos destinata al F.T.H. kies celo estas aĉeti lernomaterialojn ktp. por malriĉaj, nepagipovaj grupoj kaj unuopuloj kiuj interesiĝas pri nia lingvo kaj movado, sed pro financaj kialoj, ne povas mem ion aĉeti. Do, ni petas al vi ĉiuj sendi kiel eble plej multajn poŝtmarkojn al tiu laùdinda fonduso. DANKON.

PAS-PORTA SERVO: La Pasaporta Servo de TEJO faciligas la gastigon de esperantistoj en ĉiuj landoj ĉe enlandaj samideanoj.
Se vi deziras gastigi esperantistojn aù esti gastigata en amika hejmo, petu al ni informfolion. La PASAPORTA SERVO eldonos broŝuron enhavantan gastig- -ofertojn kaj petojn. Tiu broŝuro estos havebla kun rabato se vi ĝin mendos antaù la 30ª de novembro 73.

# LA HIPIOJ

Ni ĉiuj vidis kaj vidadas tiujn junulojn ekstravagance vestitajn kun longa hararo kaj pendantaj de iliaj koloj el la plej neverŝajna medalionoj. Ili estas la "hipioj", personoj, kiujn la socio forpuŝas, kaj ili siavice forpuŝas la socion. Ili sin vestas tiel, por montri la nekonformiĝon pri la projektitaj direktricoj; ili diras, ke luktas poratingi la liberecon, kaj iuj eĉ pensas ke reale luktas, vidigante, ke nenio maltrankviligas ilin, sed estas tre eraraj se ili reale kredas, ke ili atingos ion pozitivan per siaj vivmaniero kaj kondukto, ili nur atingas pli delokiĝi ĝis kiam ili trovos ĉiujn pordojn fermitajn; nur kiuj retiriĝos ĝustatempe el la erara vojo kiun trairas, denove revenos al la socio; kvankam ĝi ne estas konforma al iliaj ideoj, ili celas trovi agmanieron por ke ĉiutage plibone ni interkompreniĝu.



Ili, la "hipioj", traiças la vilaĝojn kaj urbojn, ne interesiĝante pri iliaj ekonomio kaj kutimoj; ili celas travivi aparte, foje kreante plezurojn per alkoholo aŭ io pli malbona: la drogo; plezuroj kiuj nur daŭras momenton kaj poste malaperas, ŝanĝitaj en hororan realecon, ili ne antaŭvidas siajn palajn kaj patosajn vizaĝojn, kiuj ĉe la florado de iliaj ekzistadoj estas fiaskigitaj de la nekontrolita diboĉemo.

Tiuj-ĉi junuloj havas strangajn ideojn pri nia socio; ili diras ke serĉas egalecojn kaj rajtojn por ĉiuj homoj, ili ne konformiĝas kun la sociaj reguloj establitaj, kaj anstataŭ trakti pri la reformiĝo kaj korekti tiujn ĉi eblajn malperfektaĵojn, kiuj povas

ekzisti (almenaŭ ili tiel ĝin kredas), malatentas malkuraĝe la vivon serĉante ĝuojn kie nur estas plezuroj tie kie nur ekzistas amaraĵoj kaj malfeliĉoj, kiuj iom post iom detruas iliajn vivojn ĝis kiam iun tagon, fizike kaj morale elĉerpitaj, turnos la okulojn al la tagoj kaj la tempo, kiujn ili pasigis, kaj tiam ili demandos sin mem: kion ni atingis ?, kaj la nura respondo reale, trista estos: nenion; aŭ plej bone dirite, jes, ion ni atingis : esti malestimitaj de la aliaj homoj kaj anticipi la morton. Tiam ili komprenos ke reale estis eraraj kiam ili celis atingi ion, kion nek ili mem sciis kio estis, aŭ se ili ĝin sciis, ne kapablis serĉi plej bonan solvon, kaj kredis ke neatento estis la plej bona maniero por aranĝi la aferojn.

Teksto: J.K. Kintas
Traduk: S. Olivan

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

## Savarmea KANTO

Melodio laŭ:
La fluanta tajdo

Ho, tre gaja estas mi,
ĉar mi estas inter vi,
kiuj kantas tralalu kaj tralali

Pro misio de pragan'
donu monon en la man'.

Se vi povas, donu tuj
el la monuj'. (Halleluja).
Al la savarmeo venu.
Tuj feliĉa iĝas vi . (Halleluja).

Jenm nuziko de gitar'
en kafejo kaj en bar',
ĉar ni volas multan monon
por ni mem. (Halleluja).

KAI L. HENRIKSEN

# PABLO NERUDA

La 23ªn de Septembro de 1973ª j. mortis la unua poeto, ne nur el Ĉilio, sed el Latinameriko kaj el la hispana lingvo. Pablo Neruda estis homo kun eksterordinaraj ecoj kiu posedis grandan sentemon je homa solidareco.



Hodiaŭ la literaturo konfuziĝas pri kio neniam antaŭe oni skribis, la vortoj de la ekstero de la vortoj antaŭ la malapero de la gajninto en 1971 j. de la Nobel Premio. Lia morto devigas la kulturon el la hispana lingvo al orakola silento.

La poezio estas nedisigeble el la homoj kaj tio estas la leciono de tiu ĉi eksterordinara poeto, honoro por la hispana lingvo, gloro por niaj beletroj kaj por la historio de la mondo dum tiu-ĉi troŝarĝita jarcento. Neruda naskiĝis batalante kaj li mortis batalante per la armilo kion li posedis, plej efika ol ĉiuj aliaj: la poezio. Lia vivo kaj verko estas nedisigeblaj.

Li naskiĝis la 12ªn de julio de 1904j. en Parral (Ĉilio), Rikardo Eliecer Neftalí Reyes, kiu poste definitive adoptus en la jaro 1920 la nomon de Pablo Neruda. Kiam li estas 13ª jara aperas lian unuan eldonaĵon; du jaroj poste li gajnas sian unuan poetan premion dank' al poemo " La kanzono de la festo ". En 1927 komencas lia politika kariero kaj li estas elektita honora konsulo en Birmanio. En 1934 j. li alvenas la unuan fojon en Hispanio kaj li estas elektita konsulo en Barcelono. Multfoje li konferencas kaj vojaĝas kiel politikisto tra la tuta mondo.

Por priskribi la heredaĵon de Neruda ni bezonus, pro ĝia granda graveco, multe da loko kaj tempo, tial ni nur citos kelkajn el liaj verkaĵoj: "Dudek ampoemoj kaj unu malespera kanzono","restado sur la Tero","ĝenerala kanto","memoroj el Nigra Insulo","mortinta galopado","nefruktodona geografio".....

Nuntempe, memoro kiel tiu al la figuro de tiu-ĉi

granda poeto, estas alvoko, averto por vojantoj, ela ĉeto. Min akordigas al ni mem kaj al la literaturo.
Morto, kie estas via venko ? .

Teksto KROKODILULAĈO
Trad. MARI-JOSE

& & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & &

# Krioj de l' mizero

Vi loĝas en palaco.
Mi en mizera ĉambro.
Min kovras ŝvit'de laco.
Freŝigas vin la ombro.
Ornamas vin la oro.
Virinon via, gemoj.
Muelas min doloro,
kaj de l'edzin'la ĝemoj
Konservas vian sanon,
nektaro de láfablo.
Satigi min eĉ panon,
ne havas mia Karlo.
Senzorge luksajn vestojn
infanoj viaj portas.
Malsato la intestojn,
de miaj idoj tordas.
Predikas vi pri justo.
Perforton vi malbenas,
dum ftizon en la brusto
mi venki vane penas.
Kaj tamen se riproĉo
ribelas el korfundo,
tuj tondras via voĉo.

Vipbaton al la hundo!
Ekhaltu la vipbaton!
rigardu la mizeron
per kiu sen kompato
plenŝutis jam la teron.
Ho! venu en la domon.
Ho! venu por minuto
ekvidi min la homon
en stato de l'jungbruto.
Pasigu nur momenton
en rancas feĉ de l'putro
gustumu seban lenton
de la akvumiga nutro
kaj trinku en la poto
la akvon de la pesto.
Brak'en la koto
sur mia pajla nesto.
Rigardu la mienojn
de la idaĉoj favaj.
Karesu la ekzemojn
de vangoj pusohavaj.
Al brusto ilin prenu

(daŭrigota)